Inter la multaj vizitoj, mi citos nur la kelkajn sekvantajn. En la plej malgranda distilejo de Skotlando (laŭ la gvidanto) ni aĉetis kelkajn botelojn de tiu-ĉi tre forta trinkaĵo tiel nomata: viskio!.. Sur la lago "Katrine", la ŝipo malkovrigis al ni, ne la teruran serpenton sed belegan vidpunkton sur la skota pejzaĝo, okaze de agrabla rondiro. La golfludo regas en la urbo St-Andrews, kaj ankaŭ la ruinoj! Kaj finfine mi citu la grandiozan edimburgan kastelon "Holyrood"...

Reirante al Londono ni renkontis ĉe la landlimo de Skotlando fajfantan sak-flutiston, kiu tre tutkore pozis kontraŭ kelkaj moneroj; ne necesas diri la sukceson de tiu folkloro ulo, des pli ke ni neniam aŭdis tiun instrumenton dum nia tuta vojaĝo...

F.-X. GILBERT (55 BAR-le-DUC)

PLENA SUKCESO DE NIA STAĜO DE "PAROLATA ESPERANTO" ★


Tradicie, en nia Orient-franca Federacio, ni rendevuas ĉe la "Ermitage St-Jean" por la "parolata esperanto-staĝo", komence de la aŭtuna sezono. Je la 7a kaj 8a de oktobro, pli ol kvardek homoj partoprenis tiun kunsidon por interŝanĝi ideojn, perfektigi aŭ eklerni la internacian lingvon. Kelkaj amikaj najbaroj el Luksemburgio kaj Germanio vizitis nin.

Kiel kutime, Sinjorino NAU aranĝis la materialaĵojn agrable kaj perfekte. Dum la vespero, Sinjoro COLNOT montris al ni belajn lumbildojn pri grekaj insuloj, kiujn ĵus li vizitis kun sia edzino. Kaj la nokta surprizo venis sub la formo de "iluziisto", kiu sukcesis ne aperi... antaŭ foriri!

La studa parto dispartigis la staĝanojn inter kvar kursoj, de la baza kurso ĝis la preparado al la superaj ekzamenoj. La libroservo ebligis al ĉiu, aĉeti aŭ trafolumi la novaĵojn, ĉar estis multe da interesaj kaj novaj libroj: ni povas citi la "Komercon Terminaron", tute noveldonita de la fakgrupo I.K.E.F. (Internacia kaj Ekonomia Fakgrupo).

Por fini, mi volas diri nian grandan ĝojon, konstatante ke multaj gejunuloj partoprenis tiun staĝon! Ni esperas denove renkonti ilin okaze de la printempa staĝo

François-Xavier GILBERT
55000 BAR-le-DUC



fundo okazos post 30 minutoj) klarigas la disvolviĝon de nia vizito. Antaŭ ĉio: la sekuraj instrukcioj; iu fakisto klarigas la manipulado de oksigena aparataro uzenda, se okazus mingaso aŭ incendio... Ĝojige!

Ni direktas nin al la banĉambro de inĝenieroj kaj post kelkaj minutoj ni eliras, tute vestitaj kiel ministoj! Bluaj pantalonoj kaj jakoj, ĉemizo, botoj, ŝultrotuko, kasko kaj lampo... eĉ la kalsonon oni liveras! Poste buso veturigas nin ĝis la enirejo de la puto.

Ekas granda Aventuro!

Kune kun la ministoj, kiuj laboras posttagmeze, per lifto sen lateraj vandoj, ni atingas profundecon de pli ol 800 metroj. Por tion fari ni bezonas 5 minutojn. Ĝoje ni kon-



Ni perfekte rekonas la aŭtorinon de la raporto kaj la redaktoron de LA INFORMILO. Apud ili ni vidas la invitantinon, Jocelyne MARTINET.

Foto: P. DENIS (ĉiuj rajtoj rezervitaj)

rifuĝejon, se okazus incendio, ni transpasas ventiladkluzadon, surgrimpas glitigan eskalon kaj finfine alvenas en la koro mem de l' minejo.

La ekspluatata vejno kuŝas tie, tre nigra, tre malseka, mallarĝa, abrupta... sed vivanta! Ni apenaŭ kapablas diferencigi la ministojn laborantajn, ili estas tiom nigraj, ke ni intermiksas ilin kun la krudaj karbaj vandoj!

Subite fajfilego sonoregas! "Ne eblas funkciigi la tranĉmaŝinegon, informas ministo, tro da mingaso!" Ni devas longe atendi sed afable niaj kunuloj donas pluajn klarigojn pri la rolo de ĉiuj, pri la maniero funkciigi tiujn grandegajn ŝraŭbolevilojn, kiuj subtenas la plafonon, pri la rimedo por malfermi la ekspluatatan parton, por tranĉi tiujn pulvoriĝemajn blokojn, formeti la karbon kaj ĝin direkti eksteren... Finfine la giganta maŝino bone ekfunkcias... Ni firmigas nin sur la soklo de iu ŝraŭbolevilo! Ni retenas nian spiron kaj, en surdiga bruego, la tranĉmaŝinego atakas la vandon, kiu iom rezistas kaj disfalegas! Ni eksentas la streĉadon de la ministoj kaj ilian kvietiĝon, kiam haltas la maŝino kaj kiam ĉio bone sukcesas...

Post kelkaj horoj, reirante la "kaelaron", oni povas konfuzi nin kun la veraj "nigraj faŭkoj"! Nun ni kuraĝas gliti en varman akvon, en la banujo preparita de iu ministo, kiu deĵoras ĉe la inĝenieroj. Poste ni revivos, pere de kontrol-ekrano, nian aventuron en la internaĵo de karba baseno. Por resumi, ĉiu en nia grupo, brave, plenkuraĝe kaj taŭge, faris la tuton de tiu "heroaĵo"... Sed vere, kia vivo por la ministoj!

Mireille DILLENCHNEIDER
55000 BAR-le-DUC

Vendredon, la 16an de junio...

Tagmeze! Ni alvenas en la koro de karba baseno, en Mozelo-oriento, kaj por tiuj, kiuj ne konas tiun lokon, estas vera surprizo! La suno akceptas nin kaj la verda, onda pejzaĝo ne priaŭguras la penegajn laborojn, kiuj estas praktikataj.

Antaŭ malkovri ilin, malpeza manĝo estas nepre necesa: manĝo por la fortoj, malpeza por la sinteno.


Jen la 14a... Ni eniras la ĉirkaŭon de STIRING ĉe la "Puto Simon". Forgesita la florata kamparo! Fronte al ni stariĝas la tipaj konstruaĵoj, nigraj pro la polvokarbo. Inĝenieroj bonvenigas nin kaj per kelkaj vortoj (manko da tempo, fakte foriro por la

versacias, la ministoj estas tre simpatiaj, jam impresas al ni kvazaŭ ni estus kunuloj, kunlaborantoj! Estas ja la unua fojo, ke Esperantistoj surpaŝas la grundon de mino, la laboristoj miras kaj scivoleme multe demandas pri tiu "sekto"...

Por atingi la ekspluatatan vejnon de karbo, je 1187 metroj de profundeco, ni devas eniri trajneton, kiu havas tre malaltajn aperturojn... Priatentu la kaskojn!!!

Ni trairas grandegajn galeriojn kaj pene marŝas en forta, varma kaj malseka trablovo, malkovras detektilojn de mingaso -malkviete-

**pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...**



**➔ nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...**



UNE DATE A NOTER SUR VOTRE AGENDA 1990... ☆

NOTRE 29ème STAGE "D'ESPERANTO PARLE" aura lieu le samedi 31 mars et le dimanche 1er avril dans la charmante localité alsacienne de Merkwiller-Péchelbronn (67250) à environ 20 km de Haguenau, non loin de Betschdorf.

C'est dans l'Hôtel-Restaurant qui accueillera les participants que se dérouleront toutes les séquences habituelles du stage (plus la "soirée-détente"... en cours d'élaboration!).

Nous lançons d'ores et déjà une invitation à nos nouveaux "élèves" qui pourront faire connaissance avec l'excellente ambiance amicale de nos rencontres, recevoir éventuellement leur 1er (ou second!) diplôme... et s'entretenir en Langue Internationale avec des espérantophones d'au-delà des frontières.

Un bulletin d'inscription sera inséré dans le n° 69 de "La Informilo" qui paraîtra en février.

Il pourra être envoyé par anticipation, et ce à partir du 15 janvier, en s'adressant à l'organisatrice du stage:

Mme Odette SCHEIDEL
35, Grand' Rue
F-67660 BETSCHDORF

INFORMATION IMPORTANTE

Ce stage sera suivi, le dimanche après-midi, de l'ASSEMBLEE GENERALE de la Fédération. Nous comptons bien évidemment sur la présence de bon nombre de ses membres qui sont cordialement invités à partager le déjeuner amical qui précèdera les débats. Tous renseignements pratiques dans le prochain n° du bulletin.

LA KVINPETALO
internacia stagejo de LF-koop

respondecas: Suzanne Bourot
adminstras: Societo Yvonne Martinot
pĉk Limoges 2408-62 H



route de Civaux
F-86410 Bouresse (Francio)
tel. +33-49-428074

Aprilo de la 13-a ĝis la 18-a Trejnado al konversacio. Prezentado de Esperanto-kulturo. Tiu stage sin turnas ĉefe al perkorespondaj lernantoj.
Majo de la 5-a ĝis la 8-a Okaze de la kvinjariĝo de la Kvinpetalo :
"Internacia literatura Forumo :
Omage al G. Waringhien - prelega sed ne elkatedre"
Bonvolu peti la specialan programon.
Julio de la 5-a ĝis la 10-a Stage por la perkorespondaj gelnantoj.

Julio de la 12-a ĝis la 17-a Preparado al la skribaj partoj de "Pedagogia Ekzameno" kaj "Altaj Studoj". Gvidantoj J.Thierry, G.Lagrange kaj R.Gilles.

Julio de la 19-a ĝis la 24-a Formado de progresigaj instruistoj - preparado al la parolaj partoj de "Kapabeco" kaj "Pedagogia Ekzameno".

Aŭgusto de la 2-a ĝis la 6-a Tradukstaĝo : literaturaj verkoj.

Gvidanto G. Lagrange.

Aŭgusto de la 7-a ĝis la 13-a Konatiĝo kun la regiono "Poitou". Formado de ĉiĉeronoj.

Aŭgusto de la 14-a ĝis la 18-a Formado de assembleaj respondeculoj : kiel prezidi, protokoli, prepari rezolucion...

Gvidanto G. Silber.

Kulturaj Aranĝoj 1990 **ĉe Kastelo Grésillon**

- 11/4-20/4: **Praktika formado de Esperanto-instruantoj**
Prezento de diversaj metodoj, teoriaj kaj praktikaj konsiloj. Samtempe:
Internacia renkonto de infanoj
Kursoj, redaktado de staĝ-gazeto, promenadoj, distraĵoj.
- 15/6-2/7: **Internacia amika renkonto**
Nedevisa programo: kursoj, gvidata konversacio, komunaj promenadoj kaj ekskursoj, distraĵaj vesperoj.
- 2/7-16/7: **Prelegoj kaj kursoj**
Serio de diverstemaj prelegoj, kursoj por diverslingva lernantaro, gvidata konversacio, ekskursoj, distraĵaj vesperoj.
- 17/7-31/7: **Lernu kaj praktiku (I)**
Kursoj por diverslingva lernantaro, gvidata konversacio, ekskursoj, distraĵaj vesperoj.
- 1/8-15/8: **Lernu kaj praktiku (II)**
Kursoj por diverslingva lernantaro, gvidata konversacio, ekskursoj, distraĵaj vesperoj.
- 16/8-31/8: **Somera lernejo**
kursoj por diversnaciaj lernantoj, "la arto traduki" (2-a semajno), gvidata konversacio, ekskursoj, distraĵaj vesperoj.

*Kultura Esperanto-Domo
Kastelo "Grésillon"
F-49150 BAUGÉ, Francujo
telefono: 41 89 10 34
40 76 77 95 (ekstersezono)*

*Poŝtkonto: Maison Culturelle Esperantiste, Nantes 1485 39
PBankkonto: BPBA Nantes 5801902570 9*



Pri aliaj aranĝoj en la trimestro: → apartaj inform-komunikoj aliloke en ĉi-tiu bulteno. Ni tamen denove atentigas vin ĉi-tie pri nia printempa staĝo federacia:

30an de marto - lan de aprilo 1989
en MERKWILLER-PECHELBRONN

NOTRE MATERIEL D'EXPOSITION: PRATIQUE, EFFICACE...



UTILISEZ-LE!

A nouveau remis en service après réactualisation (statistiques en particulier) ce matériel est constitué de 9 panneaux rigides double-face, de 0,80 x 0,60 soit une surface de documents informatifs de 8,64 m²... Les panneaux sont insérés dans un cadre d'aluminium. Les 9 éléments sont à poser verticalement et peuvent se solidariser au gré de l'utilisateur (méthodes de présentation jointes). Le tout est conditionné dans une solide caisse de bois munie de 4 poignées pour en faciliter la manipulation. Poids total: 35kg.

LISTE DES THEMES EVOQUES: *le "S.I.A." - la tour de Babel - la communication à l'ère des satellites - le mythe de l'anglais - nécessité d'une L.I. - Zamenhof - L'E°, langue facile - l'E° et sa presse - l'E° et sa littérature - l'E° sur les ondes - l'E° et la musique - l'E° et la philatélie - les services de l'E° - l'E° efficace à 100 % partout comment apprendre l'E° - pour tous... le monde à portée de main - avec l'E°... fini de "babéler"!*

Ce matériel, propriété de la Fédération, est mis gratuitement à disposition sur simple demande. Seuls les frais de transport sont à la charge du demandeur.

Responsable à contacter: Claude NOURMONT, 2 Om Kläppchen, L-5682 DALHEIM
tél.: 688 64

STUDI FERIANTE
ESPERANTO-STAĜOJ POR KOMENCANTOJ KAJ PROGRESANTOJ

Kultura Centro Esperantista
La Chaux-de-Fonds, Svislando

1990 januaro 22-27 - februaro 12-17 (se alvenos almenaŭ 5 aliĝoj) kaj 19-24 - marto 19-24 - aprilo 23-28 - majo 21-26 - junio 4-9 (se alvenos almenaŭ 5 aliĝoj) kaj 18-23 - julio 2-7 (se alvenos almenaŭ 5 aliĝoj) - 9-14 (se alvenos almenaŭ 5 aliĝoj) - 16-21, - 16-21 - 23-28 - julio 30 - aŭgusto 4 - aŭgusto 6-11 - 13-18 - 20-25 (se alvenos almenaŭ 5 aliĝoj) - aŭgusto 27 - septembro 1 (se alvenos almenaŭ 5 aliĝoj) - septembro 24-29 - oktobro 22-27 - ktp...

Kiuj deziras eklerni esperanton aŭ perfektigi en ties praktiko, tiuj venas el la tuta mondo al La Chaux-de-Fonds. La instruado estas taŭge programita, distra kaj humurplena. Tiel ĉiu staĝo por komencantoj kaj por progresantoj iĝas neforgesebla feri-semajno en bela svisa montara regiono. La kursgvidantoj efike helpas ĉiujn en la lernado per rimedoj bazitaj sur la teknikoj aŭdvida, perbilda, pergesta kaj struktur-ŝanĝa. Ili neniam parolas nacilingve, eĉ kun la tutkomencantoj, kaj iliaj lingvistaj konoj helpas ilin priatenti la lingvajn apartaĵojn de ĉiu lernanto. La staĝon povas do partopreni iu ajn lingvano. **Studi matene, ferii posttagmeze, kune pasigi agrablajn vesperojn en esperantlingva medio:** jen la vivo ĉe Kultura Centro Esperantista.

Daŭro de la staĝo: ĉiu staĝo komenciĝas lunde (alveno la matenon) kaj finiĝas sabate post la matenmanĝo. Al tiuj, kiuj venas de malproksime, ni rekomendas alveni jam dimanĉe por havi ripozan nokton antaŭ la staĝo. Antaŭ- aŭ post-staĝa restado feria aŭ studa ĉiam eblas.

ALIĜILO

(detranĉu kaj sendu ĝin al: KCE, PF 779, CH - 2301 LA CHAUX-DE-FONDS, Svislando)

Substreku tion, kio vin koncernas kaj skribu tre legeble!

Mi aliĝas al la esperanto-staĝo de (dato): komencantoj - progresantoj
Nomo familia: Nomo individua:
Sekso: ino - viro Naskiĝjaro: Gepatra (ĉefa) lingvo:
Aliaj lingvoj (nivelo): Profesio:
Adreso: Strato kaj domnumero:
Poŝtkodo: LOKO: Lando:
Telefonnumero:

Tranoktado: Mi deziras tranokti en ĉambro 1- / 2- / 4-lita.
Mi ŝatus lui feri-loĝejon 2-litan - 4/5-litan.

Mi konfirmas mian aliĝon per antaŭpago de SF (svisaj frankoj) 150.- al la poŝtĉekkonto 23-2921-8 Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds (la poŝtĉekkonto centro estas la urbo La Chaux-de-Fonds mem). (Ni repagos la antaŭpagon al aliĝintoj, kiuj ne povos veni, nur se la nepartoprenon kaŭzis malsano aŭ akcidento). Pagoj eblas per eŭroĉekoj.

Dato:

Subskribo:

KURSO PRI FAKA TRADUKADO

organizita de
Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds
kaj de
BSO/Research en Utrecht

interesinda!

aliĝinda!

Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds (Svislando) kaj BSO/Research en Utrecht (Nederlando) kunlabore okazigas kurson pri faka tradukado. La kurso daŭros tri plenajn labortagojn kaj okazos ĉe KCE en La Chaux-de-Fonds. Ĝi malfermiĝos la ĵaŭdon 18-an de januaro 1990 je la 18h00 antaŭ la unua komuna vespermanĝo kaj konkludiĝos dimanĉe 21-an de januaro posttagmeze.

La komputila traduksistemo DLT, evoluigata ĉe BSO en Utrecht, estonte bezonos ampleksan kolekton da diversspecaj fakaj tekstoj en etna lingvo paralele kun altnivela traduko en esperanto. Tradukoj laritaj de homoj funkcios kiel modeloj el kiuj la komputila sistemo derivos sian scion pri tradukado. Lige al tiu bezono BSO deziras sproni la kapablon profesinivele traduki al kaj el esperanto. La kurso direktiĝas tamen ne nur al kunlaborantoj de BSO, sed estas malferma al ĉiu kvalifikita aliĝemulo. Estas 24 lokoj. (Por partopreni la kurson ne necesas ia scio pri komputiloj kaj oni ne uzos komputilojn dum la kurso.)

La kurso traktos interalie la manovradon inter precizeco kaj libereco en tradukado kaj la uzeblecon kaj la fidecon de vortaroj kaj konsultlibroj. Ĝi temos pri tradukado kiel transigo al alia lingvo, sed ankaŭ pri tradukado kiel taŭgigo por alia legantaro kun alia sciofono.

Estos lekcionoj kaj praktikadoj. La kursanoj mem skribe tradukos gvidate de fakuloj. La instruistoj estos Claude PIRON (Svislando), kies tradukistaj spertoj devenas interalie el Monda Organizaĵo pri Sano, Brian MOON (Luksemburgio) de la tradukfako de Eŭropa Komunumo kaj Klaus SCHUBERT (Nederlando) de la esplorfako ĉe BSO/Research. Pliaj detaloj estos sciigitaj al la aliĝintoj, interalie pri la situo de KCE en La Chaux-de-Fonds.

La kotizoj inkluzivas la instruadon, tri tranoktojn kaj ĉiujn manĝojn de la ĵaŭda vespermanĝo ĝis la dimanĉa tagmanĝo. Ili estas por unu persono po svisaj frankoj 220.- en unulita ĉambro, SF 180.- en dulita kaj SF 150.- en kvarlita. (Pliaj tranoktoj kaj manĝoj eblas laŭ individua mendo.)

Aliĝo kun la mencio faka tradukado 18-21 januaro 1990 estu sendita al Kultura Centro Esperantista, Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Telefono: el eksterlando +41 739 26 74 07; el Svislando (039) 26 74 07. Ĝi donu la ĉisekvajn sciigojn: a) nomo familia; b) nomo individua; c) sekso (ino - viro); d) naskiĝdato; e) profesio aŭ nunaj studoj; f) adreso; g) telefonnumero; h) tranoktado: mi deziras tranokti en ĉambro 1- / 2- / 4-lita; i) nepre indiku, kiu estas via gepatra lingvo kaj kiugrade vi regas kiujn fremdajn lingvojn el kiuj vi kapablas traduki al esperanto. j) dato kaj subskribo.

La aliĝon konfirmu antaŭpago de SF 150.- al la poŝtĉekkonto 23-2921-8 Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds (la poŝtĉekkonto centro estas la urbo La Chaux-de-Fonds mem). Pagoj eblas per eŭroĉekoj aŭ aliaj bankaj ĉekoj, sed aldoniĝas banka takso de po SF 10.- por perbanka pago.

Se aliĝos pli ol 24 personoj, iuj bedaŭrinde devos esti malakceptitaj. Ĉiu aliĝinto ĝustatenpe ricevos informon pri la akcepto aŭ malakcepto de sia aliĝo.

ELEKTU LAŬ VIA PROPRA EMO!...

22-27 januaro: LA ETAPOJ DE LA CENTJARA DISVOLVIĜO DE ESPERANTO. Instruas Ilona KOUTNY, hungarino, gvidantino de la Esperanto-fako ĉe la Teknika Universitato ELTE en Budapeŝto. Konatiĝo kun la Lingvo Internacia de Doktoro Esperanto de 1887. La tendencoj de la leksika riĉiĝo. Semantikaj evoluoj. Gramatikaj hezitoj. Verkistaj sintenoj kaj ties influoj en la lingvo-praktiko. La nunaj lingvaj tendencoj.

27-28 januaro: STUDA SEMAJNFINO POR PROGRESANTOJ KAJ KOMENCANTOJ. Prelegos Ilona KOUTNY, hungarino, esperanto-profesoro ĉe la Teknika Universitato en Budapeŝto, kaj Giorgio SILFER, prezidanto de LF-Koop. Temoj anoncotaj. Petu la detalan informilon.

29 januaro - 3 februaro: ESPERANTO INTER LA ETNAJ KAJ LA PLANITAJ LINGVOJ. Instruas Ilona KOUTNY, hungarino, gvidantino de la Esperanto-fako ĉe la Teknika Universitato ELTE en Budapeŝto. Aŭdiĝas kaj legiĝas tre variaj vidpunktoj pri la lingvaj ecoj de esperanto. Situo de esperanto inter la aliaj lingvoj laŭ la manieroj ilin priskribi. Lingva internacieco laŭ Zamenhof kaj laŭ aliaj aŭtoroj de lingvo-projektoj. Ĉu la hodiaŭa lingvistiko proponas objektivan priskribon de la situacio?

24-25 februaro: LINGVO-STUDA SEMAJNFINO POR KOMENCANTOJ KAJ PROGRESANTOJ. Tri studrondoj.

24-26 februaro (plilongigita semajnfino): BAHAA RENKONTIĜO organizita de Dries ZERDANY, svisco. La ĉirara bahaa renkontiĝo staros sub la signo de Kubo. Ni unuflanke preparos la partoprenadon al la Universala Kongreso de Esperanto en Havano kaj al la Internacia Junulara Kongreso de TEJO sur la Insulo de la Junularo ankaŭ en Kubo. Krom pri Kubo ni pritraktos la temon "Produktado de bahaa literaturo en esperanto". Dum la aranĝo ni faros kurson pri tradukado kaj eble eĉ la renkontiĝo povos esti la naskiĝloko de speciala numero de la bahaa revuo "La Nova Tago". Petu la detalan informilon.

26 februaro - 3 marto: ENKONDUKO AL LA AKTUALA ARTO. Instruas kaj gvidos la muzeajn vizitojn Pascal DUBOURG-GLATIGNY, franco, studento pri arto-historio en pariza universitato. La artaj produktaĵoj deponitaj impresionismo naskas en la menso de la interesiĝanto diversajn kompreno-problemojn. Ili fontas el teknikaj kaj konceptaj revolucioj, kiuj metamorfosis la arton de tiu epoko ĝis hodiaŭ. Oni ankaŭ analizos la alporton de la diversaj homaj sciencoj kaj la influon de la ekonomio kaj politiko en la arton de la XXa jarcento. Tiu kurso celas akiri la necesajn elementojn por aliri pere de freŝaj okuloj la tutan fenomenon de la moderna arto. La kurson kompletigos vizito al la artmuzeoj en Bazelo kaj al tiu de La Chaux-de-Fonds, kiuj prezentas ĉiujn necesajn kaj ekspluateblajn ekzemplojn.

19-24 marto: ESPERANTO-STAĜO.

24-25 marto: LINGVO-STUDA SEMAJNFINO POR KOMENCANTOJ KAJ PROGRESANTOJ

13-16 aprilo: LA MONTARO JURASO EKPRINTEMPE (Paska plilongigita semajnfino). Instruas kaj gvidos la promenadojn Claude GACOND. Dum la montosuprojn ankoraŭ kovras neĝo, en la valoj ekaperas la unuaj floroj. La Vaŭkluzaj fontoj tipaj je karsta regiono naskas riveregojn kaj estas agrable migradi en la akvoplenaj gorĝoj. Ne nur en la Centro mem disvolviĝos la klarigaj prelegoj pri la vizitotaj karakterizaĵoj, sed ankaŭ en kamparaj kafejoj, kie okazos la piknikoj. Tiu kultura turismo lasos al ĉiuj marŝemuloj neforgeseblajn rememorojn intimigajn kun tre variaj kaj tre belaj regionoj, kiun oni ĝenerale vizitas en aliaj sezonoj, kvankam la aprila havas proprajn ĉarmojn. Programo: alveno la 13-an matene. Komuna tagmanĝo kaj posttagmeza promeno en la ĉirkaŭaĵo de KCE. Sabate kaj dimanĉe: tuttagaj ekskursoj kun pikniko. Lunde ekskurso kun pikniko kaj reveno jam je la 15h00. Adiaŭa tetrinkado.

=====
Horaro ☆

Manĝoj: 8h00-8h45: matenmanĝo. 12h45: tagmanĝo. 18h30: vespermanĝo. Gastakcepto kaj libroservo: 8h30-9h00, 10h30-11h00, 14h00-14h30, 17h00-17h30. Kultura Centro Esperantista kaj ties Gastejo Edmond Privat ne estas hotelo kun noktovartisto. Tial la gastoj bonvolu priatenti tiun ĉi horaron. Okaze de alitempa alveno oni bonvolu anonci tion. Krompago de SF 5.- estas postulata por ĉiu alveno post 21h30.

=====
Staĝ-programo ☆

Lunde: alveno dum la mateno. 12h45: unua manĝo. 14h30-16h00 kaj 16h30-18h00: studo de esperanto. 18h30: manĝo. 20h00-21h30: interkonatiĝa vespero.

Marde: 8h00: matenmanĝo. 9h00-10h30 kaj 11h00-12h30: studo. 12h45: manĝo. Libera posttagmezo. 18h30: manĝo. 20h00-21h30: preleg-vespero.

Merkrede: 8h00: matenmanĝo. 9h00-10h30 kaj 11h00-12h30: studo. 12h45: manĝo. 15h00-17h00: promenado aŭ vizito de muzeo. 18h30: manĝo. Libera vespero.

Ĵaŭde: 8h00: matenmanĝo. 9h00-10h30: studo. 11h00: piedira aŭ perveturila migrado laŭ la konsisto de la grupo kaj veteraj cirkonstancoj. 13h00: pikniko en la naturo aŭ en kafejo. 19h00: loka festa manĝo: fonduo, rakledo aŭ alia specialaĵo. 20h30-23h00: amika vespero.

Vendrede: 8h00: matenmanĝo. 9h00-10h30 kaj 11h00-12h00: studo. 12h00-12h30: konkludo de la staĝo. 12h45: manĝo. Libera posttagmezo. 18h30: manĝo. 20h00-21h30: babila aŭ prelega adiaŭa vespero.

Sabate: 8h00: matenmanĝo (lasta manĝo). Forveturo aŭ plilongigo de la restado.

Prezoj: tuta aranĝo (studo, manĝoj, tranoktado, organizitaj promenadoj, vesperoj, ktp.) kostas kun tranoktado en kvarlita ĉambro: SF (svisaj frankoj) 370.-, en dulita ĉambro: SF 400.-, en unulita ĉambro: SF 460.-

Prez-reduktoj: Familia partopreno: unua familiano pagas la plenan prezon, rabato 10% por la aliaj familianoj. Organizitaj grupoj (almenaŭ 5 personoj): rabato 10%. Redukto por infanoj, lernantoj aŭ studentoj: SF 30.-.

Via partopreno en la informado pri niaj staĝoj: Grandan antaŭdankon al ĉiuj individuoj, societoj kaj gazetoj, kiuj diskonigos ĉi tiujn esperanto-staĝojn. Estas senpage haveblaj disdonotaj informiloj.

Aliaj staĝoj kaj kursoj: Se vi bone regas esperanton, aliĝu al kurso de la Internacia Altlernejo de Kultura Centro Esperantista: literaturo, historio, traduko, pedagogio kaj metodiko, interpopola konduto, filozofio, interlingvistiko, botaniko, biologio, ktp. Okazas ankaŭ aliaj interesaj aranĝoj kulturaj aŭ tutsimple feriaj, studaj semajnfinoj, piedmigradoj en la montaro, promenskiado, natur-observado, ktp. Petu la detalajn informilojn.

Feriado: Dum la tuta jaro, La Chaux-de-Fonds, urbo en la montaro, estas ideala feriejo. Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista situas je 1'100 metroj super la marnivelo en tre kvieta kvartalo de la urbo, proksime al paŝtejoj, arbaro, belaj montosuproj. Ĉirkaŭe abundas promenvojoj por migremuloj kaj ski-antoj. Bushaltejo je ducento da metroj de la Centro: linio No 6, direkto "Succès" (Sukceso), haltejo "Esperanto". Fervojlinioj al La Chaux-de-Fonds: tra Biel-Bienne el Basel, Zürich, Bern; tra Neuchâtel el Bern, Lausanne, Paris (F); tra Besançon (F) kaj Le Locle el Francio; tra Glovelier el Basel tra la montaro.

Bonvenigas vin Claude GACOND, la direktoro kaj ĉefinstruisto kaj ties kunlaborantoj.

La 48a Ĝenerala Asembleo de nia Federacio okazis en VILLERS-lès-NANCY, fine de majo (post la printempa stago), dum kiu oni elektis la novan komitataron (vidu liston en "La Informilo" n° 66).

Post la asembleo kunsidis la nova komitato.

- = La nombro de la Federacianoj estas 193 (lastjare:163). Inter ili 73 aliĝis al la nacia asocio U.F.E. (Union Française pour l'Espéranto) kaj 45 al la monda asocio U.E.A. (Universala Esperanto-Asocio).
- = Abonis "La Informilo-n" 247 homoj.
- = La perkoresponda kurso de nia Federacio fruktiĝas. Respondecas nia nelaciĝebla samideano Jean-Paul COLNOT. (lian raporton vi legu aliloke)
- = La libro-servon federacian daŭre (kaj sukcese!) prizorgas Roger DEGRELLE, kies novan adreson vi bonvolu noti denove:

LIBRO-SERVO

12, Rue Estienne D'Orves
54490 PIENNES

- = Du "Staĝoj de Parolata Esperanto" okazas jare: printempe kaj aŭtune. La ĝenerala asembleo ĉiam okazos post la unua staĝo.

AGADO DE LA GRUPOJ (laŭ la ricevitaĵ raportoj)

- = MULHOUSE: ĉiuvendrede (vespere) okazis kursoj por komencantoj (de oktobro 88 ĝis junio 89). Sep aliĝintoj; tri finlernis "Metodon 11". Ĉiujarde (vespere) renkontiĝis progresantoj. Ek de oktobro 88, en la "kultur-Domo" de Illzach, malfermo de kurso, kiu arigis nur 4 homojn spite al sendo de 130 informleteroj kaj reklamoj ĉe la lokaj gazetoj. Paralele ni menciis 2a-gradan kurson (per "Metodo 12") ankaŭ en Mulhouse (4 personoj). En februaro 89: specifa budo okaze de la "Forum des Associations" (departementa evento). Majo: 5 tagoj da informado en ROUFFACH, ĉe la "Ekologia Foiro" kun helpo de Sr^o Mas el sud-Francio. Fine de junio: informado pri E^o en elementa lernejo.
- = PONT-ST-VINCENT: Sr^o Guillaume gvidis kurson por komencantoj kaj kursetojn por infanoj post oficiala lern-horaro.
- = NANCY: multfaceta agado sub la impulso de J.-P. Colnot. Kvazaŭ daŭra informado al ĉiusecaj publikoj. Kutimaj kursoj tri-nivelaj (dudeko da personoj). Printempa finsemajna staĝo en VILLERS-lès-NANCY ĉefe prizorgita de Sinjorinoj ROUX. Postsekviĝis la Ĝenerala Asembleo. (detalaj raportoj aperas regule en "LA INFORMILO" pri la agado en Nancio).
- = BAR-le-DUC: tri kursoj (de la elementa ĝis la supera, kiu celis skriban parton de la "kapableco"). Du diplomitoj ("atesto pri lernado"). Mireille DILLENCHNEIDER kaj François-Xavier GILBERT trapasis sukcese la aluditajn skribajn partojn de l' "Atesto pri François-Xavier GILBERT trapasis siaflanke (sukcese!) la aluditajn skribajn partojn. Por la Zamenhof-Vespero ĝoje renkontiĝis 27 personoj. Specifa kurso al staĝanoj de "Institut des Forces de Vente 55" oficiale aldoniĝis al la studprogramo de tiuj gejunuloj. Aparta raporto aperis en la n° 66 de "La Informilo". 4 klubanoj ĉeestis la Nacian Kongreson de UFE en ROUEN.
Monata klub-kunveno okazis regule dum la jaro.
- = METZ: Organizo de la aŭtuna stago far (ankaŭ nelaciĝebla kaj daŭre dinamika!) Sinjorino NAU. Ĝi paralele varbas efike por nia perkoresponda kurso.
- = COLMAR: la grupanoj renkontiĝas ĉiumonate.
- = STRASBURGO: neniu raporto atingis la protokolinton.
- = GERARDMER: raportis Sr^o COLIN en la lasta numero de "La Informilo".

Ni rememorigu, ke nia kasisto A. GROSSMANN aperigis ankaŭ interesigajn statistik-tabelojn en nia trimestra bulteno.

protokolis:

Robert KUENY



=====

PRI NIA PERKORESPONDA KURSO



Dum ĉiu el la antaŭaj jaroj, ni varbis 35 perkorespondajn gelernantojn kaj 14 el ili ĉi-jare finlernis "M11", do 40%, bona cifero. Kiam la ciferoj malplibonigas, tio estas poste: el la lernantoj de 86/87 mi estas informita pri finlernado de "M12" nur fare de 3 el ili. El la jaro 87/88 saĝne nur 1 finlernis "M12" (?).

En la ĵusa lernjaro ni do varbis 46 gelernantojn. Se la rezulto (40%) estas sama, 18 devus finlerni "M11". Ĉu ni atingos tiun rezulton? Laŭ la informoj, kiujn mi posedas,

nur 9 gelernantoj ĝis nun finlernis ĝin; jam aperis 8 nomoj en "LA INFORMILO", la 9a estas Sr^o Roger MEYER en MULHOUSE, kiu lernis kun la loka grupo. Nur 5 personoj el 9 mendis "M12".

Kaj ni parolu nun pri la nova lernjaro: jam 20 komunikoj dissendiĝis, 10 en septembro por anonci samtempe la staĝon de Moulins-lès-Metz kaj 10 la 16an de novembro. Ĝis la fino de oktobro 57 personoj petis informojn. Kiel dirite aliloke, 17 el ili mendis la lan lecionon de "SAT-Amikaro", nur 1 sendis la taskon por kontrolo, nur 2 aliĝis al la perkoresponda kurso. El la 40 aliaj personoj, 9 aliĝis perkoresponde kaj 9 en parola kurso, t.e. preskaŭ 50% de la informpetintoj. Niaj flugfolioj ŝajne pli taŭgas ol tro ampleksa (16-paĝa, cetere tre bona broŝuro), ĉar kelkaj homoj informiĝas nur pro scivolemo. Se oni tre komplete informas ilin..., ili ne plu deziras vere lerni la lingvon! Kompreneble la fakto, ke ili aliĝas al kurso, ne certigas, ke ili kuraĝos lerni ĝin ĝis la fino!

Dum oktobro mi dissendis cirkulerojn al ĉirkaŭ 30 personoj, kiuj aŭ tute ne eklernis perkoresponde, aŭ ŝajnas panei post 1 aŭ 2 lecionoj. Nur 3 bonvolis respondi, ĉu por klarigi kial ili ne povis labori, ĉu por plendi pri perdiĝo de taskoj... Mi akoraŭfoje petegas ĉiujn kunlaborantojn de la kurso, informi min almenaŭ 1-foje trimestre pri la laboro (aŭ ne laboro!) de siaj gelernantoj. Sen tiuj raportoj mi tute ne povas scii, kiel funkcias la kurso. Estonte mi ne plu direktos gelernantojn al kunlaborantoj, kiuj silentas de pli ol 6 monatoj. Mi-mem raportos al ĉiuj 2-foje jare (aprile kaj oktobre) per cirkuleroj, plus kompreneble personaj leteroj, kiam necesas.

Ni ne preteratentu ĝojigan fakton: nova lernanto finlernis "M11" post... 1-monata lernado!...: Sr^o Fabrice MACHER en Flaxlanden (68720). Ĝin gvidis Sr^o Grossmann. Varman gratulon!

TEKNIKAJ INFORMOJ PRI NIA Pa -Ko

1/ Elementa Kurso: per "Metodo11" - La kotizo (jara) kun la libro kaj la laborslipoj kostas nun 185 F, plus eventuale la kasedo 55F, do 240F entute. Tiu kotizo entenas 68F por membriĝi al la Federacio kaj abono al "La Informilo" por 1990. Eble ĝi devos plialtiĝi pro la ŝanĝiĝo baldaŭa de la poŝtaj tarifoj. La ĉi-supra kotizo enkalkulas sendon registritan per rapida poŝto je 23F. Gi jam ne plu taŭgas por sendo ekster sia departemento rapide. Kia estos la situacio januare ne antaŭvideblas...

2/ Duagrada Kurso: per "Metodo12" - Kotizo jara 120F plus libro afrankite ĝis nun 59F plus eventuale kasedo 68F. (la finlernintoj de "M11" en malpli ol 5 monatoj ne pagas la kotizon por "M12").

3/ Triagrada Kurso: per "Por la Praktikantoj" (20 lecionoj) kaj "Paŝoj al Plena Posedo" (31 lecionoj) - jara kotizo 120F plus unua libro 30F plus dua libro 57F plus sendkostoj (ĝis nun por 1 libro 23F...).

4/ Prepara al "Atesto pri Kapableco" - Jara kotizo 120F plus "gvidlibro" (aŭtoro: A. Ribot) 45F afrankite, kaj krome la gelernantoj devas studi diversajn verkojn, kies kono estas necesa por bona posedo de Esperanto (vidu informojn aliloke en ĉi-tiu bulteno).

La diversaj kotizoj entenas 68F por la Federacio kaj "La Informilo".

La respondeculo de la Perkoresponda Kurso
Jean-Paul COLNOT



"...Meritita honoro!

La sabaton 25an de novembro, la Prefekto de departemento Haute-Saône, en ĉeesto de Sr^o Christian Bergelin, deputito, kaj de Sr^o Jean Kohler, urbestro de Gray, kaj de la urba konsilantaro, donis al nia amiko Geo Junier, kuratoro de la Nacia Esperanto-Muzeo en Gray, la oran stelon de la Civita Merito.

Mi deziras tute speciale gratuli nian amikon, okaze de tiu honorigo. Post multjara instruado de Esperanto en vesperaj kaj perkorespondaj kursoj, li kreis la Nacian Esperanto-Muzeon en Gray, la sola Muzeo pri Esperanto en Francio.

La subskribinto memoras, ke antaŭ 42 jaroj (novembro 1947) li ricevis el Geo Junier sian unuan lecionon de Esperanto... perkoresponde! Jun novemban sabaton, matene, mi trapasis la rekrut-ekzamenon (mi estis 19-jara), kaj revenante, mi malkovris la libron "Cours Rationnel" alvenintan el Gray. Do trankvile mi pasigis la posttagmezon kaj vesperon, for de la kutimaj drinkadoj, lernante atente la unuajn elementojn de la Internacia Lingvo. Tri monatojn poste mi ekkorespondis... Kvar jarojn poste mi loĝis en Nancy, kaj revenante el miriga bicikla rondveturado en Italio kaj Jugoslavio, mi kreis la "Nacian Perkorespondan Kurson!..."

Jean-Paul Colnot

"... En la numero 67 de "La Informilo" ni legis artikolon, kiu laŭdas la Esperanto-Muzeon en Gray, kaj ankaŭ ni rimarkis kelkajn liniojn pri la Internacia E^o-Muzeo en Vieno (Aŭstrio^o...)

"... En la n^o 67 de "La Informilo", ni legis artikolon, kiu laŭdas la Esperanto-Muzeon en Gray, kaj ankaŭ ni rimarkis kelkajn liniojn pri la Internacia E^o-Muzeo en Vieno (Aŭstrio).

La pasintan jaron, Sr^o Junier tutkore akceptis nian voĝezan grupon, kaj ni devas konfesi, ke la sindonemo, la afableco de nia amiko kaj la grandvaloreco de la muzeo ravis nin.

Aŭguste ĉi-jare, restadante en Vieno, ni antaŭgojis viziti la ŝaman J.E^o-M^on. Ĉe la monumenta pordego de la Nacia Biblioteko ni bone legis belegan surskribon "Esperanto-Muzeo" sed tie, la deĵoristoj respondas germanlingve al vi, ke ili tute ne konas tiun aferon! Efektive la Internacia Muzeo situas en alia malpli nobla loko. Post kiam ni gravis malgajan ŝtonŝtuparon, subtegmente ni malkovris malgrandan strikte ŝermitan poridon, sur kiu estas gluita verda stelo kun etikedo "Esperanto-Muzeo". Ni sonis kaj elektra malfermilo permesis nian eniron...

Dum ok tagoj en Vieno, ni nur aŭdis la germanan lingvon kaj ĉi-tie finfine ni atendis, ke samideano amike akceptu nin kaj parolu la internacian!...

"Bonan tagon, mi diris... Ĉu vi estas Esperantisto?"

-Jes, mi parolas Esperanton. El kia regiono?...

-El Francio.

-Do, vi povas viziti".

Kaj eĉ sen uru rideto, sen amika ekrigardo, la deĵoristo reiris la skibmaŝinon. Alia bibliotekisto ordigis librojn... sed li tute ignoris nin! Certe multegaj libroj kaj raraj dokumentoj riĉigas tiun muzeon sed tia indiferenteco malvarmigis nin! Ni ne plu deziris pluviziti kaj en la malfermita "taglibro", sub niaj nomoj kaj kompleta adreso, ni skribis nian elreŝigon: "En tiu loko ni ne trovis nian amikan esperantan etoson. Bedaŭrinde. Eĉ ni apenaŭ aŭdis la voĉon de la deĵoristoj..."

Kial ne vivas iu alia Sinjoro Junier en Vieno?"


Robert kaj Guitou Colin

◇ "LA INFORMILO" BONFARTAS... SED RENOVIGU FRUE VIAN ABONON! ◇

=====

Jen grafike montrita, en kiuj monatoj estis pagataj la abonoj al La Informilo en 1988/1989. Laŭ tiu grafiko oni povas rimarki ke, fine de januaro estis pagita nur 51 % de ĉiuj abonoj, fine de februaro 67 %, fine de marto 74 %. Kompare kun 1988, la rezultoj estas iom pli bonaj, respektive je 4%, 9% kaj 3% por tiuj 3 monatoj, krome la nombro da abonantoj altiĝis je 10%. Tio estas tamen pli-kuraĝiga rezulto. Por la venonta abon-jaro 1990, ni same klopodu plimultigi la nombron da abonantoj kaj malpliigi la nombron da malfruantoj. Tial bonvolu senprokraste renovigi vian abonon, kaj eventuale pagi vian kotizon.

MONATA STATISTIKO PRI LA RICEVO DE ABONOJ por 1989



=====

JEN LA FINJARAJ FESTOJ... HAVIGU AL VI AU DONACU LIBRO(J)N!!!


La danĝera lingvo	Ulrich LINS	200F	Plupo kaj la ursidoj	33F
studo pri la persekutoj kontraŭ E°			Plupo kaj la grupoj	"
Kromosomoj	LORJAK	44F	Plupo kaj la maro	"
en ĉi-tiu romano la temo ambaŭas: artefarita fekundigo kaj, precipe, ĉu la gepatraj ecoj estas herede- blaj aŭ ne. Serioza temo kvazaŭ "Ŝvarce" priraktita...			Plupo kaj la grandarbaro	"
			Plupo kaj la lupoj	"
			Inga BORG verkis tiujn 5 bildlibrojn por geknaboj	
Nigra magio	Deck DORVAL	85F	La bapto de caro Vladimir	90F
krimromano, kiu pravas, ke romano povas esti beletra frando ĝuebla kaj enigmo streĉe kapta			Karel Hlavicek Borovsky	
			Kvaropo	144F
			Auld, Dinwoodie, Francis, Rossetti	
Proveldono de	Hans WIERSCH	70F	La floroj de l' malbono	180F
komerca terminaro	kaj aliaj		Baudelaire	
en angla, germana, hispana, franca, itala lingvoj kaj en Esperanto			Martin Fierro	72F
			José Hernandez	
			Duonvoĉe	45F
			G.E. Maura	

...Simpla poŝtkart-mendilo al nia libro-servo (adreso aliloke). Fakturo en pakaĵo.

? CONGRES DE LA FEDERATION ESPERANTISTE !
DE L'EST

La Fédération Espérantiste de l'Est, dont le territoire comprend les départements suivants: Meuse, Meurthe-et-Moselle, Vosges, Moselle, Bas-Rhin, Haut-Rhin, Haute-Saône et territoire de Belfort, a tenu son congrès annuel le 3 avril dernier dans la jolie ville alsacienne de Sélestat. M. Bastier, sous-préfet de l'arrondissement de Sélestat, avait tenu à patronner ce congrès, dont M. le docteur Bronner, maire de Sélestat, avait accepté la présidence d'honneur.

La séance fut ouverte par M. le docteur Bronner, qui se déclara heureux du choix que les organisateurs avaient fait de Sélestat pour lieu de leur congrès. Il rappela en quelques mots l'utilité de l'Espéranto dans tous les domaines, et insista sur la nécessité de cette langue à ceux qui portent tous leurs efforts vers la réalisation d'une paix et d'une humanité meilleures. M. le sous-préfet Bastier revint sur cette idée et montra que les haines qui séparent encore les peuples tomberont fatalement le jour où ces peuples se comprendront mutuellement. Dans un discours dont l'éloquence fut très goûtée, M. Bastier montra que l'Espéranto est une des nécessités de notre époque, qui voit les langues nationales et régionales, loin de se réduire en nombre, se multiplier en se différenciant et en se distinguant tous les jours, malgré l'apport inévitable des mots étrangers, au fur et à mesure que croît leur richesse littéraire. L'Espéranto, loin de nuire aux langues nationales, assurera leur indépendance. M. Bastier remercia les Espérantistes des efforts désintéressés qu'ils apportent à leur belle cause.



La Tour de la rue des Chevaliers à Sélestat (Bas-Rhin) où s'est tenu le Congrès de la Fédération Espérantiste de l'Est, du 3 avril 19

M. Férez, président de la Fédération Espérantiste de l'Est et membre du conseil d'administration de la Société Française pour la Propagation de l'Espéranto, remercia chaleureusement M. le sous-préfet et M. le maire du haut appui moral qu'ils avaient bien voulu accorder au congrès. Il les assura du dévouement des Espérantistes à la tâche élevée qu'ils se sont donnée comme but. Il remercia enfin la ville de Sélestat de son hospitalité bienveillante, et M. le professeur Latour, créateur du nouveau groupe local, de l'accueil enthousiaste fait aux congressistes.

Le congrès procéda ensuite à ses travaux: lecture des rapports du secrétaire général et du trésorier, réélection du comité, votes divers.

Bischwiller (Bas-Rhin) est désigné pour recevoir le congrès de l'an prochain. A Colmar (Haut-Rhin) aura lieu au cours de cet été une manifestation en l'honneur du anniversaire de la création de l'Espéranto.

Un banquet très amical eut lieu entre les séances du matin et de la soirée, au cours duquel des toasts furent prononcés.

On apprécia particulièrement une allocution remarquablement spirituelle de M. Baumgartner, plus connu dans les milieux littéraires sous le pseudonyme de Jean Barret, qui représentait le groupe de Colmar.

Le congrès fut clos après que fut chanté en chœur "La Espero", l'hymne traditionnel des Espérantistes.

Raymond HUG
Ingénieur T.P.E.

Délégué à Schiltigheim de l'Association Espérantiste Universelle.

- CONCOURS = 1/ En quelle année s'est déroulé le Congrès précité?
2/ Dans quelle publication et à quelle date est paru l'article ci-dessus?

Le premier de nos lecteurs qui fera parvenir à la rédaction les réponses à ces deux questions se verra récompenser par l'envoi du livre de cours de second degré: "Por la Praktikantoj".

===== M ★ M-J =====

Nia fidela amiko Michel BASSO edziĝis la 25an de novembro 1989. Al li kaj al Marie-Jeanne ni bondeziras elkore, esperante, ke la novan paron ni konkrete salutos okaze de iu venonta Esperanto-renkontiĝo!

Claude Piron
La bona lingvo
112 p. 14,10 gld.

Vi ne povos diskuti pri Esperanto, se vi ne konas tiun verkon, kiu sensacie klare montras la superecon de la Zamenhofa lingvo.

Ĉi tiu poemaro kvazaŭ inaŭguris la unuan maturan periodon de la Esperanta poezio, per sia intima enhavo kaj melodias stilo.

Edmond Privat
Tra l' silento
28 p. 7,80 gld.

FERVOJA TERMINARO en Esperanto

eldonis: Terminara Komisiono de IFEF
redaktis: G. Ritterspach kaj H. D. Hartig
suplemento al seslingva oficiala terminaro de la Internacia Fervoj-Unio (UIC), Parizo.

10205 terminoj sur 228 paĝoj, laŭnumere kaj laŭalfabete.
Baza terminologia verko, interesa ne nur por fervojistoj!
Mendu de la Libroservo de UEA. Prezo 15,30 gld.



distra angelo



KONKURSO

La 2 unuaj ricevitaj respondoj al la 2 enigmoj premiĝos sian aŭtoron. Donacotaj libroj:

- 1/ "Ĉu rakonti novele?!" J. Valano
- 2/ "Tiaj ni estas!" Sandor J. Bako

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

1									
2			F						
3				E					
4		J			L				
5			A			I			
6				R			Ĉ		
7					O			A	
8						N			N
9									
10									

KRUCVORTENIGMO

HORIZONTALA = 1 foresto de koloroj (r) - participfinaĵo. 2 sin deteni de nutraĵo - vesto (r). 3 neutila insekto krustulo. 4 tirola kanto (r) - komika sceneto (r). 5 ĝui provizore ion kontraŭ pago (r) - surfaco (r) - nedefinita adjektivo - provizora ĝuo kontraŭ pago. 6 numeralo - metalenhava mineralo (r) - sufikso - sufikso. 7 dorsomalformaĵo - norda monero (r) - liternomo. 8 plumtufo (r) - rifuza - nomo (fonetike). 9 maljesi - regula movado - sufikso. 10 spirita percepto - mikroskopa fungeto (r) - internacia prefikso.

VERTIKALA = 1 arbo - malhelpi. 2 preskaŭ flui - malagrabla piketi - multekosta ŝtono (r). 3 iom da afableco - patriarko - konfuzata de trinkado. 4 banantranĉaĵo - geometria solido (r) - unuo de laboro (r). 5 neakompaneteco - nedefinita pronomo. 6 spirita atmosfero (r) - nedefinita adjektivo - abstraktaĵo (r). 7 malbonodora insekto (r) - farunmanĝaĵo (r) irigi boaton. 8 el kosta metalo - prepozicio - malgranda - koro de homo. 9 malnova lumigilo (r) - iom utila - stulta modadmiranto (r). 10 certigo por ricevi "La Informilo"n - disigi en pluraj pecoj.

SILABENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabeto ordigitaj vorteroj, malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformos proverbon.

ad ak an be bo eg el em en ero et ev go ia io kva lo lo lo mo mo no ob od olo op or ori po po po ra ra ro ror ru se si sl smo ste ta ta te to to to to tu van vi vra

- 1 + - + - - - homaro
- 2 + - + - - - malofta
- 3 + - + - - - donaceto
- 4 + - + - - - mortonto
- 5 + - + - - - lirika poemo
- 6 + - + - - - germana regiono
- 7 + - + - - - aervesiketo
- 8 + - + - - - favora okazo
- 9 + - + - - - supernuba ĉielo
- 10 + - + - - - tertremo
- 11 + - + - - - japana mato
- 12 + - + - - - banale tradicia
- 13 + - + - - - aro el ses voĉoj
- 14 + - + - - - konvencia lingvo
- 15 + - + - - - kompatinda
- 16 + - + - - - difinita okazaĵo
- 17 + - + - - - balenoptero
- 18 + - + - - - simbola protektantaĵo
- 19 + - + - - - influi flarsensoj




Ĉerpita el la magazino "Télé-Loisirs" (EVENTUALA LEGENDO: "Nenia dubo... vintro ja alvenis!...")

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ (N° 67) = KRUCVORTOJ: aŭkcio rotang ulno krekso aŭ dio log mal run aktini uzin ne cinamo ripar egal apero met ov rimed eben lakeo rolulo ino tremol uri tatu tia poz od oliban ĉizoj

SILABENIGMO: "Homo estas erarema sed perfektebla".



Frohe Weihnachten und ein gutes neues Jahr



Feliz Navidad Próspero Año Nuevo



Buon Natale Felice Anno Nuovo



Preflige Kerstdagen Gelukkig Nieuwjaar